

Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE)
kaj fervojfaka revuo



2016.5

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Publika
Komitatkunsido:
La Protokolo

Karaj gelegantoj,

pasas la somero kaj la ĉefa sezono de esperantistaj aranĝoj. Jam la pasinta IFK en Varna donis okazon rigardi malantaŭ la kurtenon de la sekvonta jaro. La akcento de tiu ĉi IF-eldono kun raporteto pri la postkongreso en Veliko Tarnovo kaj la aktivecoj de IFEF dum la Universala Kongreso en Nitra – kaj kompreneble la longa protokolo pri la pasinta publika komitatkunsido - tamen estas retrospektiva.

La pretendon esti fervojfaka revuo pravigas du kontribuoj de niaj danaj geamikoj, kiuj observas la evoluojn en la skandinaviaj landoj. La origine antaŭviditan artikolon pri la surrela transporto de danĝeraj varoj, kiun dankinde disponigis Manfred Trenne, fakulo el Magdeburg, mi devis retiri pro la statuta rango de la protokolo. Sed mi volonte cedas ĝin, ĉar por tekstoj pli profunde prilumantaj fervojajn temojn IFEF ja disponigas la Fervojfakajn Kajerojn.

Tiu-ĉi IF estas la dua eldono kun nova redaktoro, ŝanĝita redaktora komisiono, alia presejo, ŝanĝita dissendomaniero de la presitaj ekzempleroj kaj nova retroŝta adresaro. Ĉi-lastata – pli vere la retroŝta dissendo – kaŭzis la plej grandajn problemojn ŝulditajn ne al malĝustaj adresoj sed al rigoraj kaj objekte tro suspektemaj spamblokaj sistemoj. La elekto de alternativa (akceptropreta) retservanto majoritate helpis. Ankaŭ la rezignon pri aparte kompostita versio „por printi” kaj la sugeston apliki la „broŝuro”-printkomandon de la legoprogramo sekvis multaj responditaj demandoj.

Mi resume anticipas vian aprobon. Kuraĝu kontakti min kaj plendi, se mi eraras.

Amikajn salutojn

Guido Brandenburg

Enhavo:

Karaj gelegantoj	82
Enhavo, presindikoj	83
Pordo al la bulgara popolo	84
La 101-a Universala Kongreso en Nitra	87
Bonvenon ree en FISAIC	89
Protokolo pri la publika komitatkunsido dum la 68-a IFK	90
Distanc kontrolitaj senhomaj miniaturaj aviadiloj servas la fervojon	98
Svedio frue komencis privatigi fervojon	99

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEFF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) rodica_todor@yahoo.com

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) laurent.vignaud@free.fr

Redaktoro: Guido Brandenburg (Germanio) guido.brandenburg@t-online.de

Gvidanto de la Faka Komisiono: Jan Niemann (Danlando) niemann@kabelmail.dk

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danlando), Jean Ripoche (Francio), István Gulyás (Hungario)

Membroj de la Faka Komisiono

D-ro Heinz Hoffmann (Germanio), Ladislav Kovař (Ĉeĥa Respubliko)

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud IFEFF”,

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEFF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

Pordo al la bulgara popolo

Postkongresaj tagoj en Veliko Tarnovo



Foto: Nikola Gruev, WikiMedia

Veliko Tarnovo – sur kruta bordo de la Jantra-rivero konstruita urbo kun siaj spironrabaj perspektivoj kaj pitoreskaj loĝkvartaloj jam delonge estas ŝatata turista celo – sufiĉaj argumentoj por grupo de IFEF-kongresanoj post la semajno en Varna pasigi tie kelkajn postkongresajn tagojn. Post alveno en la centre situanta kvarstela hotelo la partoprenantoj kaptis la okazon por mallonga orientiga promeno, vespermanĝis kaj tiam kolektis fortojn por la tuttaga ekskurso.

La 29-an de Majo 2016 la vojo kondukis sudokcidenten al la vilaĝo Boĵenci en distrikto Gabrovo. La vilaĝon fondis rifuĝintoj el Veliko Tarnovo, siatempe ĉefurbo de la bulgara regno, kiuj forlasis la urbon post ties konkero fare de la Turkoj en la jaro 1393 kaj serĉis kaŝejon malfacile atingeblan de la okupantoj. La legendo rakontas pri Boĵana, nobelulino

alveninta komune kun riĉaj metiistoj kaj komercistoj. Ili konstruis la fundamenton por floranta ekonomio. La vilaĝo ampleksis pli ol cent domojn kaj pro historia bonŝanco konservis sian karakteron ĝis la malkovro meze de la dudeka jarcento, kiam montriĝis, ke Boĵenci estas modela vilaĝo el la bulgara pasinteco. Troveblas tie ŝtonpavimaj stratoj, domoj kun arkitekturo de Renesanco, ŝtonaj pontoj super rivero Boĵenka, vilaĝa centra placo kun butikoj kaj kafejo, kiu ofertas kafon, brogitan en varmega sablo – bona ideo en momento de aperanta laco. Malnova lernejo estis la lasta stacio en tiu ĉarma vilaĝo, kompreneble ne nur por rigardi sed ankaŭ por lerni. Tasko por la postkongresantoj estis skribi bildkarton per ansera plumo.



Ŝtonpavimataj stratoj en Boĵenci
Foto: Petja Aleksandrova

Sekvis vizito en proksima subĉiela muzeo “Etar”, kiu per la kolekto de kvindek domoj el la tempo “bulgara renaskiĝo” ne nur peras impreson pri la tiutempa arkitekturo, sed ankaŭ kvazaŭ en vilaĝo kun lernejo, horloĝa turo, pontoj, ŝtonaj fontoj k.a. prezentas la tiaman vivon. En



Ankoraŭ la kato havas voston.
Foto: Petja Aleksandrova

plenekipitaj laborejoj estas praktikataj dudek plej diversaj metioj, parte manlaboraj parte subtenataj de maŝinoj, kiujn movas la akvo de la preterfluanta Sivek-rivereto. Tiel estiĝas sonoriloj por paŝto-bestoj, potoj, peltvestaĵoj, kupraj kaldronoj kaj dolĉaĵoj.

Gabrovo, la “monda humura ĉef-urbo”, estas plena da kuriozaj monumentoj kaj fieras pri aparta

muzeo pri humuro kaj satiro. La titolon la urbo dankas al la poeto Radoj Ralin, kiu kolektis kaj redaktis la anekdotojn pri ĝiaj ŝparemaj kaj ruzaj enloĝantoj. Ĉar ofte la katoj devis suferi pro ilia inventemo, la senvosta kato fariĝis simbolo de la urbo.

Lasta celo dum tiu je impresoj riĉa tago estis nacia monumento, la monaĥejo “Sankta Arkianĝelo Mihail” en Dranova, en kiu ĝermis la bulgara kristanismo kaj kulturo. La muzeo ofertas ekspozicion pri “arkeologio kaj Renesanco”. La montrataj objektoj dokumentas la evoluon de la monaĥejo kaj ĝia regiono, tiun ekde la ŝtona-kupra epoko. Aparte akcentita estas memorigo pri la ĉirkaŭe okazinta “aprila ribelo” en la jaro 1876 kontraŭ la turka okupacio, malsukcesa kaj dronigita en sanga venĝo. Necesis reveturo al la postkongresa urbo. Tial la proksime situanta groto Baĉo Kiro kaj la komenco de la grimprovo al la akvofalo Sini Vir devis resti marĝenaj.



La artekspozicia halo Boris Denev en Veliko Tarnovo
Foto: Petja Aleksandrova

La sekvintan tagon la kongresanoj vizitis la malnovan parton de Veliko Tarnovo, la iama ĉefurbo de la Dua Bulgara Regno. La urbo estas konstruita sur la montetoj Carevec, Trapezica, Momina Krepost (Virgulina fortikaĵo) kaj Sveta Gora (Sankta arba-

ro). Sur “Carevec” - nuntempe arkitektura rezervejo - estas konstruita fortikaĵo kun la cara palaco kaj la patriarkejo. La monteton ŝirmas muro kun longeco 2 km kaj larĝeco ĝis 2,60 m. En la fortikaĵon kondukas tri enirejoj. La ĉefa konsistas el tri sinsekvaj pordoj, defendeblaj el turoj. La dua (Malgranda pordego) ligas Carevec kun la Asena Kvartalo (Asenova Mahala) kaj la tria kun la Franka Kvartalo.

El la turoj estas konservita nur unu, nomata hodiaŭ Balduena Turo, kie estis enprizonigita imperatoro Baldueno. La palaco de la bulgaraj caroj estas fortigita aparta arkitektura komplekso sur plata teraso, la plej konvena loko de la monteto. La ĉefa enirejo troviĝas norde. Ĝia areo ampleksas preskaŭ kvinmil kvadratmetrojn kaj estas ĉirkaŭita de dika fortikaĵmuro kun kvin batalturoj kaj du enirejoj. La rezidejo de la bulgaraj patriarkoj leviĝas sur la plej alta loko de la monteto, enmeze la patriarka templo “Sankta Ĉieliro de Dio”.

Kelkaj interesatoj posttagmeze vizitis muzeon de la vaksofiguroj. Ili bildigas historiajn personojn kaj eventojn el la Dua Bulgara Regno. La dudek naŭ figuroj prezentas scenojn el ĉiuj tavoloj de la mezepoka bulgara socio.

Historiaj lokoj kaj okazaĵoj dum la kongreso en Varna jam estis ekskursaj temoj. La postkongresaj tagoj en Veliko Tarnovo helpis plie proksimiĝi al la animo de la bulgara popolo.

Petja Aleksandrova, Guido Brandenburg

La 101-a Universala Kongreso en Nitra

Aktivecoj de IFEF



Rodica distribuas invitilojn por Colmar
Foto: Ladislav Kovář

La 23-an de Julio komenciĝis en slovakaj urbo Nitra la unua kongreso de la dua cento de tradiciaj tutmondaj kongresoj de esperantistoj. La urbo mem situas en suda Slovakio kaj fieras pro riĉa historio kaj nuntempa moderna aspekto. La kongreson gastigis la Agrikultura Universitato kaj signifan subtenon dediĉis al ĝi la urbo mem – ĉie sur la stratoj kaj gravaj urbaj domoj estis signoj de la kongreso – esperantaj flagoj kaj informafiŝoj. Sabaton vespere dum la Movada Foiro ĉe la tablo de IFEF estis pre-

zentataj informoj pri ĝia faka agado (Fervojfakaj Kajeroj), pri la venontaj kongresoj (aliĝilo kaj informprospekto pri Colmar) kaj pri la fervojista movado ĝenerale (faldfolio pri IFEF).

La malfermo de la kongreso okazis en la Urba sporta halo kun ĉirkaŭ 1200 gepartoprenantoj sub gvidado de la nova UEA-estraro. Prezidanto Mark Fettes en sia inaŭgura parolo substrekiis moton de la kongresa temo: „Socia justeco - lingva justeco”. Dum la evento estis nomumataj tri honoraj membroj de UEA, inter ili Petro Chrdle pro siaj multjaraj meritoj pri Esperanto.

Dum lunda posttagmezo IFEF invitis al faka kunveno de fervojistoj en salono Maliarik. Prezidantino Rodica Todor konatigis preskaŭ kvardek ĉeestantojn kun rolo kaj celo de IFEF, prezentis tie noveldonitan faldfolion pri organizaĵo de fervojistoj esperantistoj kaj informis pri la venonta 69-a Internacia Fervojista Kongreso en Colmar, Francio dum Majo 2017. La parolo estis kompletigita per varbfilmeto pri la kongresa urbo mem kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Poste sekvis prelego de Jindřich Tomášek kaj Jaroslav Matuška kun temo Slovakaj fervojoj, en kiu estis priskribitaj interesaĵoj kaj allogaĵoj de slovakaj fervojreto kaj modernigoj de la fervojo faritaj dum lasta tempo. Fortan intereson meritis rakontoj de ĉeestanta Martin Stuppniĝ pri siaj spertoj en disvastigo de Esperanto inter siaj konatuloj kaj geamikoj. Lastan prelegon kun titolo „ETCS L2 en Slovakio” prezentis Ladislav Kovář. Per ĝi li montris praktikan uzon de fakaj esperantaj esprimoj en speciala fervoja fako - sekuriga tekniko. Dum la Solena Fermo de la 101-a UK oni anoncis la nomojn de 14 esperantistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Elstara Arta Agado. Inter ili estas nia membro Leopold PATEK (Aŭstrio) pro longtempa gvida rolo en la aŭstria movado kaj 25-jara ĉefdelegiteco de UEA.



Edmond Ludwig, prezidanto de *Esperanto-France Est*, substrekas: *Venu al Colmar!*

Foto: Ladislav Kovář

Bonvenon ree en FISAIC

Saluto al la 68-a IFK de la Ĝenerala Sekretario de FISAIC

Komence de 2016 la Internacia Federacio de la Artaj kaj Kulturaj Fervojistaj Asocioj (FISAIC) malfermis plian pordon al la landaj asocioj de arte kaj kulture interesataj fervojistoj serĉantaj forumon por kroĉi kaj flegi internaciajn kontaktojn - plian pordon, kies uzo nek anticipas la ekziston de reprezentanta tegmenta organizo nek apartan sekcian membrecon en ilia lando. Laŭ decido de la prezidia kunsido en Liberec (09/2015) FISAIC modele akceptas institucian membrecon de la Internacia Fervojista-Esperanto-Federacio (IFEFF) kaj per tio de tiuj landaj asocioj, por kiuj la unuaj du pordoj restas fermitaj.

La menciita decido adaptu la reglamenton al la reala situacio en kvanto da landoj, kie la eksterprofesiaj aktivecoj de la fervojistaro ne aŭ nur malmulte estas subtenataj.

Mi resalutas do la ekzistantajn membroasociojn

- Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio,
- Hispana Esperanta Fervojista Asocio,
- Itala Fervojista Esperanto-Asocio,
- Japana Esperantista Ligo Fervojista,
- Fakkomitato de Fervojistoj Esperantistoj en Slovenio



Kaj mi salutas la veran novmembron

- Kuba Esperanto-Fervojista Sekcio el Kuba Esperanto-Asocio

Mi ofertas nian forumon por komuna interkomuniko kaj komuna organizado ne nur kun kaj inter esperantistoj. Ne necesas memori pri tio, ke sub la ombrelo de FISAIC okazas plej variaj internaciaj kulturaj aktivecoj. Reprezente mi nur mencias muzikon, fotografion, arton, filatelon, kaj fervojan historion. Ni invitas la esperantistojn ludi pli gravan rolon en nia federacio. Ni invitas Esperanton ludi pli gravan rolon apud la laŭstatute oficialaj lingvoj franca kaj germana. Ni invitas IFEFF kaj ĝiajn landajn asociojn al komunaj aranĝoj kun aliaj kulturaj sekcioj. Kaj laste sed ne plej malgrave ni invitas IFEFF partopreni la Ĝeneralan Asembleon de FISAIC 22.-26.09.2016 en Toulon.

La Internacia Fervojista Kongreso kiel ĉiujare havas laboran kaj distran programon. Mi deziras al ĝi ĝustan ekvilibron, por ke la partoprenantoj post la kongresa fermo kun novaj fortoj kaj novaj ideoj reveturu hejmen.

En tiu senco de FISAIC: Sukcesan aranĝon!

Frankfurt, 09.05.2016,

Barbara Sciesinski (Ĝenerala Sekretario de FISAIC)



Protokolo pri la publika komitatkunsido

dum la 68-a IFEF-kongreso en Varna (BG) 24.05.2016

Mallongigoj: Pr = prezidanto, Vp = vicprezidanto, Sk = sekretario, Ks = kasisto, Rd = redaktoro, e-o = estraro, Ĉk = ĉefkomitatano, IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka Komisiono, TS = Terminara Sekcio, FAS = Fake Aplika Sekcio, k-o = komitato, k-ano = komitatano, kk-ano = kromkomitatano, k-go = kolego, Hm = honora membro, Hp = honora prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j). (Landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO 3166)

NB: Ĉiuj raportoĵ aperis aŭ aperos en Internacia Fervojisto

1. Malfermo, konstato de la mandatoj

La Pr-ino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.

Ĉeestas la estraranoj:	Pr-ino	Rodica TODOR	(RO)
	Sk	Vito TORNILLO	(IT)
	Ks	Laurent VIGNAUD	(FR)
	Rd	István GULYÁS	(HU)
	Ĉk	Jindřich TOMÍŠEK	(CZ)

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

	Lando	Kodo	Komitatano
01	Aŭstrio	AT	Leopold PATEK
02	Belgio	BE	Clara BRACKE
03	Bulgario	BG	Petia ALEKSANDROVA
04	Ĉeĥio	CZ	Jindřich TOMÍŠEK

	Ĉinio	CN	Neniu
	Danio	DK	Neniu
05	Francio	FR	Monique GRALL
06		FR	Christian DARDENNE
07	Germanio	DE	Achim MEINEL
08		DE	Heinz HOFFMANN
	Hispanio/Katalunio	ES	Neniu (ne rajtas)
09	Hungario	HU	István SUTKA
10	Italio	IT	Vito TORNILLO
	Japanio	JP	Neniu
	Kroatio	HR	Neniu
	Kubo	KU	Neniu (ne rajtas)
	Pollando	PL	Wiesław LIBNER (ne rajtas)
11	Rumanio	RO	Florin NEGREA
	Slovenio	SI	Neniu
12	Gvidanto FK	Kk-ano	Ladislav KOVÁŘ
	entuta ĉeesto de	9 l.a.	12 rajtigitoj

2. Ricevitaj telegramoj, leteroj

Mesaĝoj pri bondeziroj al la kongreso estis legataj dum la inaŭguro.

Inĝ. Boris Gaĝanav el Bulgara Esperanto-Asocio; Kolonelo Kanjo Kanev kiel K-ano „A“ ĉe UEA kaj flanke de E-societo „Kolombo de la paco“; S-ino Miroslava Kireva nome de Giorgio Silfer el la Esperanta Civito; S-ro Metodi Markov nome de SAT; S-ro Guido Brandenburg kunportis la salutojn de Barbara Sciesinski nome de FISAIC.

3. Honorigo al la mortintoj

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 67-a IFK-Kunming 2015 ĝis la 68-a IFK-Varna 2016. Oni honorigas ilin per unu-minuta silenta starigado; ili ripozu pace.

Lando	Antaŭnomo	Familia nomo	Naskdato	Mortdato	Aĝo	Menciindaĵo
Aŭstrio	Johann	KÖSTENBERGER			88	
Aŭstrio	Karl	POPULORUM			90	
Ĉeĥio	Miroslav	VOREL		14.04.2016		
Francio	Pierre	LE VERN	1942	31.08.2015	73	

Germanio	Elfriede	KRUSE	13.03.1914	19.03.2016	102	HM kaj IFEF-sekretariino dum jaroj 1968-1980, ricevis oran FISAIC-medalon.
Germanio	Hans-Georg	FEIßT	1938	07.08.2015	77	
Germanio	Marianne	FRANK			87	
Germanio	Hanna	HEIMLICH			85	
Germanio	Astrid	HANKE			79	
Germanio	Andreas	BIEDERMANN			67	
Germanio	Wilhelm	HILL			91	
Germanio	Werner	SCHULZ			78	
Hungario	Ferenc	PHERSY	31.08.1920	08.09.2015	95	IFEF k-ano "A" ĉe UEA
Hungario	Imre	GYIMESI	1924	22.12.2015	91	
Italio	Sergio	NEGRONI	31.03.1934	13.09.2015	81	IFEA-kasisto
Kroatio	Nevenka	JANEŠ	17.08.1943	21.01.2015	72	
Serbio	Tereza	KAPISTA	11.04.1930	28.04.2016	86	
Svisio	Ernst	GLÄTTLI	01.10.1924	01.06.2015	91	HM de IFEF, Sk de SAEF

4. Estraranaj raportoj

4.1. Sekretario

La Sk legas la resuman raporton. La raporto aperis en IF 2016-3. Neniu demando, nek rimarko (*unuanime aprokata*).

4.2. Redaktoro

La Rd voĉlegas la raporton kiu aperis en IF 2016-2 kaj la adiaŭan leteron kun dankoj al ĉiuj kunlaborantoj kaj membroj de la Rd komisiono. Aldone li deklaras ke li intencas daŭre kunlabori kiel membro de la redaktora komisiono. Neniu demando (*unuanime aprokata*).

Pr-ino gratulas s-ron Istvan Gulyás kaj dankas al li por la longdaŭra kaj efika kunlaboro en la estraro.

4.3. Kasisto

La Ks voĉlegas kaj prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj raporton kiuj aperis en IF 2016-2 (*unuanime aprokata*).

Pro malsano la revizorino Jeannine Daguin ne sukcesis sendi la atestilon pri la kontrolo de la kaso, ĝi venos poste. Ŝi ankaŭ petas, ke oni elektu novan revizoron. La k-o elektas novan revizorinon s-inon Monique Grall, kiu same kiel la kasisto loĝas en Francio.

5. Buĝeto 2017, kaj kotizkonfirmo

Estas konfirmataj la du membrokotizoj: **9** Eŭroj por reta elsendo de la revuo, kaj **15** Eŭroj por papera sendo de la revuo (*unuanime aprobata*).

6. Protokoloj de la 67-a IFK Kunming (CN)

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolojn tuj post la kongreso, ili aperis ankaŭ en IF (*unuanime aprobataj*).

7. Raporto de la ĉefkomitatano

La Ĉk voĉlegas la raporton. Neniu demando, nek rimarko (*unuanime aprobata*).

8. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)

8.1 Gvidanto

S-ro Heinz Hoffmann, delegito de FK, voĉlegas la raporton kaj informas pri la apero de la FervojFaka Kajero n-ro 24, disdonata en papera versio po unu al respondeculo de l.a.; reta versio estos dissendata al aliaj membroj kaj enretigata ĉe IFEF-paĝaro. La enhavo estas prelegoj prezentitaj dum la 67-a IFEF-kongreso en Ĉinio. Pro la granda nombro kelkaj el ili aperos nur en la venonta numero. Plue Heinz Hoffmann substrekis la fakton ke UIC agnoskas nian sensalajran laboron, ofertante al ni la eblecon uzi senpage la terminaron en reto. UIC donis al ni kodon por 10 samtempaj aliroj. Tiel multaj el niaj membroj povus redakti multajn fakajn artikolojn kun helpo de RailLexic 5.0 (*unuanime aprobata*).

8.2 Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)

S-ro Ladislav Kovář voĉlegas la raporton de la Sk de FAS. Ĉefaj argumentoj estas la internaj aferoj:

Okazis tre sukcesa faka programo dum la 100-a UK en Lille, prelego kaj vizito de regejo por la submanika fervojlinio.

S-ro Tomíšek daŭrigas eldonadon de tradukaĵoj sub titolo El Fervoja Mondo. Ĝi estas populara en diversaj E-medioj.

Kelkaj prelegoj prezentitaj dum 67-a kongreso en Kunming estis montrataj al partoprenantoj de la jarkonferenco de ĈFEA en Prago dum Marto 2016.

Aperis artikolo pri agado de IFEF en ĉeĥa fervojista sindikata gazeto.

FAS preparis fakajn prelegojn por la ĉi-jara IFEF-kongreso (*unuanime aprobata*).

8.3 Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)

S-ro Heinz Hoffmann voĉlegas la raporton de la Sk de TS. La Terminara Sekcio sukcesis esperantigi laste serion de pli ol 300 novaj nocioj de UIC kaj enigi ĉiujn en ties datumbankon. Koncerne Terminaran Kurieron, ekde la lasta kongreso aperis du numeroj kun novaj strukturo kaj vizaĝo plaĉe dezajnitaj de nia kolego Guido Bandenburg. TeKu nun aperas ankaŭ en la paĝaro ifef.net, la lastaj numeroj baldaŭ estos ĝisdatigitaj (*unuanime aprobata*).

8.4 Statutrevizia Komisiono:

Pro la fakto ke la plej grava laboro de la statuto-ŝanĝo estis farita, kaj probable en estonteco venos nur malgrandaj modifoj, la tasko kontroli la kongresproponojn rilate al la statuto restas en la manoj de la estraro. La e-o prezentu al la k-o la modifojn de la teksto por aprobo (*unuanime aprobata*).

9. Raportoj de la komisiitoj

9.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.

La Pr-ino voĉlegas la raporton pri sia tasko kiel K-ano “A” ĉe UEA pri la jaro 2015 aperintan ankaŭ en IF 2015-5 (*unuanime aprobata*).

10. Resumo de la jarraportoj 2015 el la landaj asocioj

La Sk voĉlegas la raporton. Ĝi aperos en nia revuo “Internacia Fervojisto”. La Sk plendas pro la fakto ke kelkaj l.a. ne raportis pri la agado de la komisionoj kaj laborgrupoj dum la lasta jaro kaj ne akurate respondis al la demandilo sendita de la Ĉk; pro tio kelkaj statistikoj ne reprezentas la realan situacion de IFEF. Kelkaj l.a. eĉ ne sendis la raporton (*unuanime aprobata*).

11. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF

La agado de la laborgrupoj dum lastaj monatoj montris ke la membraro estas vekebla. La celo estas stimulo al la diskuto kaj kunlaboro de kiel eble plej multaj membroj kaj trovi novajn eblecojn por varbi por IFEF kaj

Esperanto. Bedaŭrinde la estraro vane proponas. Kvankam ĝi entuziasme klopodas pri la estonteco de IFEF, niaj membroj ŝajnas spekti filmon aŭ teatraĵon. Atendeble la plimulto atendos venontjaran kongreson kaj ĝis tiam dormos silente. En la landaj jarraportoj nur kelkaj l.a. raportis pri la agado de la reprezentantoj de la komisionoj kaj laborgrupoj, kvankam la enketilo enhavis demandojn pri ĉi tiu agado. Multaj eĉ ne indikis klare la nomojn de la landaj estraranoj, la komitatano(j) kaj ties anstataŭanto(j). La k-ano ludas gravan rolon en nia federacio, pro tio ni devus scii kiu reprezentas l.a.-n. La e-o insiste invitas la l.a.-jn trovi inter siaj membroj homojn kiuj povus agadi en la laborgrupoj por vigligi ilin kaj kunlabori je internacia nivelo.

Por pli bone informi pri IFEF dum internaciaj renkontiĝoj, estas prezentata faldfolio kun faktoj pri nia federacio. Ĝi estas nur malneto. Sed, danke al la proponoj de la ĉeestantoj kaj nia Pr-ino, ĝi baldaŭ estos preta. ĈeFEA pretas printi kvanton da ili por la UK en Nitro. Diskuto pri detaloj sekvos dum la “Movadaj aferoj”.

12. Kongresproponoj:

12.1 Statut-ŝanĝoj rilate al la elekto de la ĈK.

Komentario:

La ĜR postulas, ke kandidato por la ofico de Ĉk devas esti membrinta minimume unu elektoperiodon en la k-o. Se por l.a. rajta sendi unu k-anon tiu estas la Ĉk, ĝi kaze de novelekto povas nur rekandidatigi lin/ŝin aŭ rezigni pri kandidato por almenaŭ unu elektoperiodo. Rigardante la kvanton de eblaj kandidatoj tio estas evitenda risko.

Laŭ la nuna statuto:

§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato.

1) Ĝi konsistas el komitatanoj, delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.

Povus esti:

§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato.

1) Ĝi konsistas el komitatanoj kaj **ties anstataŭantoj (aŭskultantoj)**, delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.

Laŭ la nuna regularo:

Ĝenerala Regularo § 13, Konsisto kaj elektoj de la komitato

§ 13 Al 1) kaj 2)

a) Komitatanoj kaj kromkomitatanoj devas esti aktivaj, emeritaj aŭ estintaj fervojistoj aŭ personoj el asimilitaj entreprenoj. Ili devas esti IFEF-membroj kaj devas skribe deklari pretecon konservi la oficon dum la trijara laborperiodo.

Povus esti:

Ĝenerala Regularo § 13, Konsisto kaj elektoj de la komitato

§ 13 Al 1) kaj 2)

*a) Komitatanoj, **ties anstataŭantoj** kaj kromkomitatanoj devas esti aktivaj, emeritaj aŭ estintaj fervojistoj aŭ personoj el asimilitaj entreprenoj. Ili devas esti IFEF-membroj kaj devas skribe deklari pretecon konservi la oficon dum la trijara laborperiodo.*

Post klarigoj kaj mallonga debato pri la funkcio de la anstataŭanto de la k-ano kaj substreko ke nepre en la jarraporto de l.a. oni klare menciu la nomon de la anstataŭanto, la k-o unuanime aprobas la statut-ŝanĝon.

12.2 Estrarelekto.

En la limdato pri demisio, 2 estraranoj anoncis sian rezignon pri rekandidatiĝo, la Vp-ino Sylviane Lafargue, pro familiaj kaŭzoj kaj sanproblemoj kaj la Rd István Gulyás pro sanproblemoj.

Kiel jam diskutite kaj aprobite en la nova statuto, la posteno de Vpr ne plu ekzistas; la taskoj estas dividitaj inter la ceteraj estraranoj. Eniras la estraron la gvidanto de faka komisiono s-ro Jan U.Niemann. La balotoj pri tiu posteno okazas ene de la faka komisiono, unu jaron antaŭ la balotoj pri la estraro. Pri la posteno de Rd GEFA prezentis proponon por la kandidatiĝo de s-ro Guido Brandenburg, nuna Rd de la GEFA-bulteno. La aliaj estraranoj Pr, Sk, Ks estas reelekteblaj.

La Ĉk prizorgas pri balotkomisiono kaj post la foriro de la kandidatoj, la k-o voĉdonas. Post la fino de la kalkulado de voĉoj, la kandidatoj reeniras la salonon kaj la Ĉk voĉlegas la rezulton. Ĉiuj kandidatoj estas elektitaj kun 100% da voĉoj. La nova elektita je la posteno de Rd, s-ro Guido Brandenburg, sin prezentas al la publiko, kiu per aplaŭdo bonvenigas lin.

13. Rilatoj al aliaj organizoj: UEA, FISAIC, ILEI, SAT, UMEA, ISAE.

13.1 UEA

La Pr-ino partoprenos la UK-n en Nitra, ŝi prezidos la fervojistan kunvenon kiu (eble) okazos lunde, pri la horaro oni devos kontroli la kongreslibron. Niaj ĉeĥaj kolegoj planas okazigi prelegojn dum la kontaktkunveno.

La rilatoj kun UEA estas tre bonaj. La du asocioj daŭre kunlaboras al la realigado de la agadplano de UEA, kies celoj kongruas kun la laborplano de nia faka federacio.

13.2 FISAIC

Ekde la unua de januaro IFEF estas membro de FISAIC kiel faka asocio. Ĉi-maniere l.a. de IFEF kiu ne havas nacian sektion de FISAIC aŭtomate estas membro de FISAIC. Grava puŝo venis flanke de la Sk-ino de FISAIC Barbara Sciesinski, kiu konsentas ke IFEF ludu pli gravan rolon en la internaciaj rilatoj.

La kunvenon de la FISAIC Teknika Komisiono, kiu okazis en Liberec (CZ) en Septembro 2015, partoprenis nia ĉeĥa kolego Ladislav Kovář. Li proponis nian kunlaboradon pere de FISAIC-projektoj. La venonta FISAIC- asembleo okazos en Septembro en la urbo Saint-Mandrier, apud Toulon (FR), ĝin partoprenos la IFEF Pr-ino.

13.3 Rilatoj al aliaj E-organizoj

ILEI: La rilatoj progresas danke al s-ino Luisa Madella. Kiel membro de IFEA ŝi kunlaboras ankaŭ kiel respondeculo de la laborgrupo pri instruado. Ankaŭ nia Pr-ino havis rilatojn kun ILEI-membroj. Ŝi partoprenis la kunvenon de ILEI kiu okazis en Oostende antaŭ la UK en Lille.

ISAE: Pri la asocio nenio nova estas raportenda. Post la subskribo de la kunlabora interkonsento en Lille, la prezidanto havis rilatojn kun la IFEF Pr-ino. Fakaj informoj aperas en la paĝaro de STEB, prizorgita de ISAE.

SAT: Okazas interŝanĝo de la revuoj. Nia kolego Bruno Henry estas ĝia kasisto kaj ni havas informojn freŝajn ankaŭ pere de li persone. Nia membro Metodi Markov, el Bulgario, partoprenos la venontan SAT-kongreson, salutos nome de IFEF kaj rekonfirmos niajn rilatojn.

UMEA: la rilatoj daŭrigas pere de interŝanĝo de la revuoj kaj de utilaj informoj ambaŭflanke.

14. Venontaj kongresoj

14.1 Konfirmo de invito al la 69-a IFK en 2017

La venonta IFK okazos en Francio, Alzaco, en urbo Colmar (Kolmaro); la LKK konsistas ĉefe el lokaj esperantistoj, kiuj volonte okupiĝas pri la organizado kvankam ne estas fervojistoj. Nia Pr-ino Rodica Todor prenis la Pr-taskon de LKK por kunordigi la organizadon, la FFEA-anoj prenis la taskon pri la organizado de la fakaj prelegoj kaj kulturaj vesperoj. La Pr-ino prezentis filmon kaj dokumentojn preparitajn de la alzaca asocio, ĉar de tiu asocio neniu povis partopreni la kongreson en Bulgario. Estis diskutataj kelkaj ŝanĝoj en la programo de la kongreso. Kun tiuj ŝanĝoj la novaj aliĝiloj estu presataj (*unanime aprobata*).

14.2 Elektro de lando por la 70-a IFK en 2018

Rilate la jaron 2018, okazis interparolado kun nia pola kolego Libner, kiu promesas esplori la eblecon organizi la IFEF-kongreson en Pollando.

14.3 Diskuto pri pluaj eblecoj

Oni esploru aliajn eblecojn por la venontaj jaroj kongresi ene de naciaj asocioj kiuj povus inviti nin al memstara aranĝo aŭ al partopreno dum ilia nacia kongreso, se ĝi kongruas kun nia kutima organiza periodo.

15. Eventualaĵoj

Pri la agado de la laborgrupoj oni prokrastas la diskutadon al la kunveno “Movadaj Aferoj”.

16. Libera diskutado

Nenio estas demandata. Manke de aliaj intervenoj, la Pr-ino fermas la kunsidon.

Varna, 24.05.2016

La sekretario, Vito Tornillo

Distanckontrolitaj senhomaj miniaturaj aviadiloj servas la fervojon

La tri-dimensia teknologio eniras pli kaj pli la laboron kaj la projektojn ĉie kaj ankaŭ ĉe *banedanmark*. Momente superflugas la marbordan fervojlinion *Kystbanen* inter *Klampenborg* kaj *Helsingør* distanckontro-

litaj miniaturaj aviadiloj por fari mezurojn geodeziajn necesajn por la traklaboro venontjare.

Miniatura aviadilo farita de speciala ŝaŭmplasta materialo – 1,5 kg peza – flugas tien kaj reen laŭ la fervoja itinero por kolekti datumojn. La ĉef-inĝeniero diras: 'Ni povus uzi mezurrezultojn faritajn de termezuristoj aŭ per helikoptero, sed tiu ĉi metodo estas multe malpli kosta.' Oni mezuras pontojn, fosaĵojn, kablojn, mastojn kaj la surfacon de la balasto, kaj la rezultojn oni povas vidi surekrane – tridimensie (3D). Tio donas al la projekto la plej bonajn kaj precizajn datumojn. La celo de la 3D-mezuroj estas kiel eble plej multe eviti erarojn dum la projektlaboro. Oni facile surekrane vidas, ĉu estas sufiĉe da loko sub ponto aŭ inter bariloj; ankaŭ oni havas precizan kalkulon de la amaso de tero, gruzo kaj balasto necesa por la laboro. Ĉiun punkton de la 37 km longa fervojparto la aviadilo superflugas ses fojojn por certigi sufiĉe altkvalitan rezulton. La vetero devas bone kondukti, por ke oni havu bonan rezulton: la suno devas brili, kaj la vento ne estu tro forta.



Miniatura helikoptero foto- kaj mezurcela

Estas pliaj pozitivaj efikoj de la 3D-mezuroj ol por nur tiu projekto. Krom konkretajn mezurojn oni kolektas ankaŭ spertojn por estontaj projektoj. La estonteco estas tridimensia, kaj *banedanmark* deziras 'kapti tiun trajnon'. Negativa afero (el la vidpunkto de homoj) estas, ke eble kelkaj termezuristoj perdas sian laboron.

DEFA (Fonto: *baneavisen* 28042016)

Svedio frue komencis privatigi fervojon ...

Kiam la unuaj fervojoj en Svedio konstruiĝis meze de la 19-a jarcento, la ŝtato laŭleĝe prizorgu fervojan reton, kiu kunligas la diversajn regionojn. Privataj fervojoj, ĉefe regionaj, supleme al tio funkciis kaj evoluis. Tamen, ekde la 1940-aj jaroj pli kaj pli malfacilis, ĉefe pro la multaj privataj aŭtoj. Homoj elektis la novan, komfortan 'de pordo al pordo'-transporton.

Granda fervojtrafika reformo en 1988 signifis i.a.:

- fondiĝis *Banverket*, kiu prizorgu la fervojreton por hejpi al la ŝtataj fervojoj *SJ*
- administra divido de la fervoja trafiko en la ŝtata, baza reto kaj la regiona reto – la malantaŭa penso estis, ke post nelonge la regionajn trajnojn anstataŭas aŭtobusoj, kaj tiujn antaŭvidite nepopularajn decidojn do ne la ŝtato, sed la regionoj faru.

En la trafikjaro 1993-1994 oni por la unua fojo privatigis en ordinara konkurenco. Komence, dum la unuaj jaroj, estis nur malgranda afero, ĉar *SJ* estis tre forta. Ĝi posedis la 'komunajn servojn' – staciojn, metiejojn, biletsistemon, kaj kompreneble *SJ* volis havi pagon, se aliaj uzis tiujn servojn.

La unua grava ŝanĝo okazis en 1999, kiam *Svenska Tågkompaniet* (firmao fondita de tri iamaj *SJ*-direktoroj) gajnis la licencon pri trafiko de noktaj trajnoj al kaj de norda *Nordland*-regiono. La monopolo de *SJ* estis per tio rompita, kaj ekde tiam evoluis la afero tre multe.

Komence la ŝanĝoj okazis nur malrapide, kaj oni ne tro bone kunordiĝis inter la ŝtato kaj la regionoj, sed kiam la kvar regionaj fervojentreprenoj fondis komunan ombrelan/filinan kompanion por pli bone kunordigi la agadon por povi kontraŭstari *SJ*, plirapidiĝis la afero. Signifon havis ankaŭ, ke en 2001 *SJ* pro registara decido perdis la kontrolon de stacioj kaj metiejoj.

Hodiaŭ la tuta regiona trafiko estas adjudikita en ordinara konkurenco. Por certigi, ke oni ne 'aĉetas' nur laŭ la 'teknika prezo', sed ankaŭ laŭ klienta vidpunkto, la regiontrafika kompanio kunlaboras kun entrepreno, kiu evoluigis sistematikan superrigardan kaj pritraktan sistemon, kaj la tasko de la ekspluatanto inkluzivas plenumon de tiu sistemo – rilate al trafiko, bontenado de fervojreto kaj aliaj servoj.

Precipe tiu kontrolado ofte aliloke estas la malforta punkto en la ŝtata publika trafiko, kun sekvoj ne nur malpreciza trajntrafiko, sed ankaŭ en la daŭro de tempo malbone prizorgataj trajnoj kaj vagonoj.